

Michel Fontaine (Ĉinio)

Videokonferenco kun Songanta 16/majo 2101

Ĉies nomoj :

Ni uzos la skajpkonton de Qin Lao Shi (ĉefinstruistino de la klaso) por la videokonferenco : btlqintong

La gelernantoj : Ĉielo, , Fiŝo, Flora, Folia, Jeanne [ĵan'], Lago, Mara, Matena, Nina, Oceano, Ondo, Papilia (Pap'), Rido, Ruĝa, Salika, Suno, Tenera.

Du patrinoj (kiuj ankaŭ lernis esperanton dum du jaroj) : Lili (patrino de Jeanne) kaj Herba (patrino de Folia)

1/ Unua sekvenco : Demandoj pri Mazi :

- Kiu estas la nomo de la lando, kie la gereĝoj estas ?
- Kia estas la reĝo ?
- Kia estas la reĝino ?
- Ĉu ili havas filon aŭ filinon ? Kiu li aŭ ŝi estas ?
- Kio estas Karlo ?
- Kiuj amas Silvjan ?
- Kiun Silvja amas ?
- Ĉu Silvja amas Korvaks ?
- Ĉu Korvaks estas afabla aŭ ne ?
- Kiujn fruktojn la reĝo kaj la reĝino kolektas ?
- Kia estas Mazi ?
- De kie li venas ?
- Kion li ŝatas manĝi ?
- Kion Silvja metas en sian sakon ?
- Kiel Silvja kaj Karlo foriras ?

2/ Dua sekvenco: kune legi paĝon 34 de Poŝamiko

- Songanta legas ĉiujn vortojn pounu, ili ripetas
- Songanta petas ke iu legu
- Songanta ĵetas demandojn : kiun beston vi plej ŝatas ? kiun beston vi tute ne ŝatas ? kiu besto plej plaĉas al vi ? kiu besto tute ne plaĉas al vi ?

3/ Tria sekvenco : Demandojn pri ilia lasta leciono (Moderna E° por infanoj 3 – Beijing Language and Culture University Press) :

Unue ni kune relegu la lecionon :

Scivolema Lulu : Lulu estas scivolema knabo. Li ofte faras demandojn. Ekzemple : Kial estas tago kaj nokto ? Kial pluvas kaj ventas ? Kial birdoj povas flugi ? Kial fiŝoj povas naĝi ? Kie estas Afriko ? Ĉu la tero estas ronda ?... Kiam li ricevas kontentan respondon, li tre ĝojas.

- Ĉu vi ŝatas fruktojn ? Kiujn fruktojn ?

- Ĉu vi faras sporton ? Kiun sporton ?
- Ĉu Lulu estas scivolema knabo ?
- Ĉu vi estas scivolema knabo-ino ?
- Kiujn demandojn Lulu faras ?
- Ĉu laŭ vi la tero estas ronda ?
- Ĉu Lulu ĝojas kiam li ricevas kontentan respondon ?
- Kiam vi ĝojas ?

4/ Kvara sekvenco : Songanta ordonas.

Ekzemple : Stariĝu... Sidiĝu...Nur X stariĝu... Nur X sidiĝu... Fermu la okulojn... Levu la dekstran manon...Se pluvas, levu ambaŭ manojn... Se ne pluvas levu ambaŭ brakojn...X iru al la nigra tabulo kaj per ruĝa kredo skribu « Songanta »...Montru Neĝetan...Montru min kaj vin...X iru ĉe la pordon...

5/ Kvina sekvenco : ĵeti demandojn al Songanta.

Ni provu lasi ilin esprimi scivolemon. Se ili ne parolus, ni helpos ilin.

6/ Lasta sekvenco : kune kanti « Vi kaj Mi » (himno de OL Pekino 2008)

ESPERO
 中國教育 · .com · cn

"Vi kaj Mi"

Vortoj kaj muziko de Chen Qigang, elĉinigis Laŭlum

3 5 1 — 2 3 6 — 1 2 3 5 3 — — —
 Vi kaj mi de l' ter- glob' sta- ras kor' ĉe kor'.

3 5 1 — 2 3 6 — 2 5 2 3 1 — — —
 Be- la sonĝ' al Bei- jing lo- gas nin de for.

6 — 5 — 6 — 1 — 2 6 3 5 2 — — —
 Ho, a- mi- koj ĉir- kaŭ- bra- ku ni,

3 5 1 — 2 3 6 — 2 5 2 3 1 — — —
 Vi kaj mi kor' ĉe kor' en hom- fa- mi- li'.

64